89-a Universala Kongreso de Esperanto

Pekino, 24-31 julio 2004

DUA BULTENO



Kongresa Temo

Lingva egaleco en internaciaj rilatoj

Enhavo

Loka Kongresa Komitato ..... interna kovrilo
Por eniri la landon 2
Utilaj informoj pri Ĉinio kaj Pekino 3
Loĝado en Pekino 5
  Hoteloj kaj aliaj loĝebloj 6
Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj 9
  Vizitotaj urboj kaj vidaĵoj 10
  Antaŭkongresoj 13
  Postkongresaj ekskursoj 16
Dumkongresaj ekskursoj 19
  Tuttagaj ekskursoj 20
  Duontagaj ekskursoj 22
  Semajna skemo de ekskursoj 26
Bankedo 27
Provizora programo 28
Programeroj dum UK 28
Kiu kongresos kiam kaj kie? 29
Ĝeneralaj informoj 30
Kontaktinformoj 32
Kongresaj perantoj ..... interna dorskovrilo

Loka Kongresa Komitato

Tan Xiuzhu	–	prezidanto
Yu Mingxin	–	vicprezidanto
Yu Tao	–	vicprezidanto, ĝenerala sekretario
Wang Hanping	–	asista ĝenerala sekretario, kasisto
Xiang Hong	–	sekretario, gazetara servo
Zou Guoxiang	–	programo, administrado
Wang Ruixiang	–	ekskursoj
Nan Youli	–	loĝigo
Wang Fang	–	artaj aranĝoj
Li Weilun	–	bonveniga servo
Wang Yanjing	–	kongresejo
Zhao Jianping	–	giĉetoj; informejo
Wang Lihua	–	kongresa hejmpaĝo
Wen Jingen	–	kongresa kuriero
Jiang Limin	–	junulara programo, amasloĝejo
Li Shijun (Laulum)	–	rektoro de IKU

89-a Universala Kongreso de Esperanto

DUA BULTENO

Pekino

24-31 julio 2004

Por eniri la landon

Ĝenerale. Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj, kaj ke ili konstante ŝanĝiĝas. Tial bv. nepre mem kontroli ĉe la plej proksima kongreslanda diplomatia reprezentejo (bv. mem trovi ties adreson en via ĉefurbo aŭ najbara lando), ĉu vi devas havi vizon, kaj sub kiuj kondiĉoj. UEA kaj LKK ne povos helpi pri vizpetoj faritaj post la 1-a de majo 2004, kaj principe ne povos respondi al tiaj malfruaj petoj.

Se vi vizitas aliajn landojn, Honkongon, Makaon aŭ Tibeton, bv. kontroli ankaŭ pri la neceso havi vizon por tiuj landoj/regionoj kaj eventuale reeniran vizon al Ĉinio. Listo de landoj kiuj bezonas vizon por Honkongo troveblas ĉe: http://www.immd.gov.hk/ehtml/hkvisas_4.htm (tamen bv. kontroli ĉe la ĉina ambasadejo ĉu la informo estas ĝisdata).

Retpaĝo de Ĉinio pri turismo: http://www.cnta.com.

Retpaĝo de Honkongo: http://www.immd.gov.hk/index.html.

Retpaĝo de Makao, pri vizoj: http://www.macau.gov.mo.

La kongresanoj mem devas zorgi pri la akiro de vizoj. En escepte komplikaj kazoj oni povas peti helpon de UEA kaj LKK.

Datoj. Bv. noti, ke la invitletero povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresa daŭro (24-31 de julio 2004, eventuale plus daŭro de menditaj antaŭ- kaj/aŭ postkongresoj). Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private.

Konfirmiloj kaj invitleteroj. Normale la kongresa konfirmilo devus sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. La konsulejoj povas postuli oficialan invitleteron, kiun UEA sendos se oni petas ĝin, al aliĝintaj kongresanoj el vizbezonaj landoj. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfirmaĵojn. Bv. konscii, ke nek UEA nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

Mongarantio. Senkonsidere ĉu oni havas aŭ ne la vizon, necesas pruvi ĉe la eniro en la landon ke oni posedas sufiĉajn monrimedojn por la restado. Al kongresanoj kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ venas je aparta invito de UEA), oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri pagitaj servoj. Tio povas parte kompensi la postulon pri posedo de sufiĉaj monrimedoj. UEA kaj LKK ne donas financajn garantiojn al kongresanoj el nepagipovaj landoj. Kongresano mem devas pruvi al la vizdona instanco posedon de sufiĉaj rimedoj por restado en la kongresa lando.

Asekuroj. Unu el la postuloj por ricevi vizon estas akiro de asekuro, pri kio la kongresanoj zorgu mem. Ofte tute taŭga asekuro estas aĉetebla ĉe flughavenoj.



Utilaj informoj pri Ĉinio kaj Pekino

Kongresejo. La Pekina Internacia Konferenca Centro situas en la Vilaĝo de Azia Sportkunveno (Yayuncun), je 9 km norde de la urbocentro. Adreso: Beijing, Chaoyang-distrikto, Beichendonglu 8, CN-100101, Ĉinio. Por korespondado, bv. uzi la adreson de UEA.

Klimato. Musona kun klare distingitaj kvar sezonoj. Julie kaj aŭguste la temperaturo povas atingi ĉ. 30 celsiusajn gradojn. Tiam pluvo estas ofta; pro tio bv. porti ombrelon aŭ pluvmantelon.

Elektro. 220-volta, 50-herca. Kontaktiloj dupolusaj kaj tripolusaj, rondaj kaj plataj.

Akvo. En Ĉinio la kranakvo ne estas tuj trinkebla. La ĉinoj kutime trinkas boligitan akvon.

Mono. *Renminbi* (RMB). La baza unuo estas juano (*yuan*), kiu egalas 10 ĵiaojn (*jiao*) aŭ 100 fenojn (*fen*). Ekzistas biletoj je 1, 2, 5, 10, 20, 50 kaj 100 juanoj kaj 1, 2 kaj 5 ĵiaoj, kaj moneroj je 1, 2, 5 fenoj, 1 kaj 5 ĵiaoj kaj 1 juano.

Tempo. Ok horojn antaŭ la Universala Tempo (GMT).

Atentigo. La flugkompania alianco Star Alliance funkcias kiel la oficiala transportisto de la Pekina UK. Laŭ kontrakto kun UEA, ĝi donas pli avantaĝajn prezojn al la kongresanoj por flugi al la UK. Kadre de la kontrakto UEA transdonas al Star Alliance la adresojn de la kongresanoj por eventualaj rektaj kontaktoj kun la kongresanoj lige kun la UK. UEA ne transdonos la adresojn de tiuj, kiuj skribe malpermesis tion ĝis la 31-a de marto 2004 (bv. skribi al la adreso de la CO poŝte aŭ rete).

Monŝanĝo. Internacie konverteblajn valutojn eblas ŝanĝi en la Banko de Ĉinio, la internacia flughaveno de Pekino, la kongresejo, kaj iuj grandaj hoteloj. La interŝanĝa kurzo estas egala. Ne ŝanĝu monon en neoficialaj monŝanĝejoj, nek kun privatuloj. Je la 12-a de januaro 2004 unu eŭro valoris 10,54 juanojn.

Telefono. Ĉinio +86, Pekino +10. En ĉiuj hoteloj kaj la kongresejo la kongresanoj povas telefoni alilanden. Surstrate staras telefonbudoj. Por uzi tiujn budojn aĉetu en poŝtoficejo "IP"-kartojn kontraŭ 30, 50, 100 aŭ 200 juanoj.

Prezoj. Por plejparto de la okcidentanoj la ĉinaj prezoj estas relative malaltaj, sed en komercaj centroj kaj turismaj vendejoj iom altaj.

Sekureco. En Pekino kaj aliaj grandaj urboj necesas singardemo pri mono kaj havaĵoj.

Lingvoj. La oficiala lingvo en Ĉinio estas la hana, kaj la plej ofte uzata fremda lingvo estas la angla.

Medikamentoj. Se vi uzas preskribitajn medikamentojn, bv. kunporti kuracistan recepton en la latina.

Sanservoj. Medicinaj servoj de pluraj landoj havas kontraktojn kun Ĉinio, surbaze de kiuj eksterlandanoj povas uzi la samajn servojn kiel enlandaj loĝantoj. Bv. mem kontroli, ĉu via lando havas tian kontrakton kaj sub kiuj kondiĉoj. Eksterlandanoj havu konfirmilon pri san-asekuro. LKK kaj UEA ne respondecas pri asekuro de la kongresanoj.

Trafiko. Aŭtobusoj, metroo kaj taksioj estas, krom bicikloj, la ĉefaj trafikiloj en Pekino. La ĉefurba flughaveno troviĝas je 30 km for de la urbocentro de Pekino kaj je 25 km for de la kongresejo. Por veturi de ĝi al la kongresejo eblas preni taksion, aŭ flughavenan buson kiu ekveturas je 20-minutaj intervaloj. La flughavenaj busoj iras tra Sanyuanqiao, Dabeiyao, Wangfujing, Xidan kaj aliaj trafikaj nodoj. *Du tagojn antaŭ la Kongreso LKK havos akceptejon en la flughaveno, kaj la kongresanoj povos veturi per difinitaj busoj al hoteloj ofertataj de UEA pagante po 10 eŭrojn (vd. mendilon).*

En Pekino funkcias 400 aŭtobusaj linioj, 14 trolebusaj linioj kaj du subteraj fervojoj. La busoj funkcias ĉiutage de 5h00 ĝis 23h00. Proksime de la kongresejo estas pluraj linioj al la difinitaj hoteloj kaj al la urbocentro.

Loĝado en Pekino

Ĝeneralaj kondiĉoj de mendoj. La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj dorsflanke de la mendilo kaj plurloke en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Estas konsilinde legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

Loĝdatoj. Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la hotelo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la forlaso de la hotelo (foriro; do, la daton de la lasta mateno en la hotelo).

Eniro kaj eliro. Principe, eblas okupi ĉambrojn post la tagmezo de la mendita dato kaj necesas forlasi la ĉambrojn ĝis la tagmezo de la lasta tago. Hoteloj estas normale flekseblaj pri tio. Se vi ne okupas ĉambron dum la unua mendita tago, oni kutime nuligas la rezervon, kaj vi perdas la pagitan sumon.

Dulitaj ĉambroj kaj hazarda kunloĝigo. La loĝiga servo ne povas aranĝi hazardan kunloĝigon de nekonatoj, pro kio dulitajn ĉambrojn oni disponigas *nur* al duopoj kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, do eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi al homoj kiuj nepre volas loĝi en dulitaj ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, ĉe la retpaĝo de la Kongreso (http://www.uea.org/kongresoj/uk_2004.html) troveblas anonctabulo por tiu celo.

Frueco de la mendo kaj alternativaj mendoj. Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la Kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue, kaj ne eblas garantii la plenumon de la originala mendo ĉiam laŭ la preciza deziro de la mendanto. Tial ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn. *En la retpaĝo de la Kongreso eblas scii, kiuj hoteloj jam estas plenaj.*

Pagoj. La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago.

Ofertataj servoj. La ĉambroj de la menciitaj hoteloj (ne de la turisma servoloĝejo) havas telefonon, televidilon, duŝejon (kelkaj ankaŭ bankuvon) kaj necesejon. La prezo inkluzivas la matenmanĝon, krom se menciite alie.

Limdatoj. La limdato por fari mendojn estas la 1-a de majo 2004. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte, ĝis la 1-a de junio, kaj nepre kontraŭ aparta krompago (40 eŭroj). Pri malmendaj reguloj konsultu la dorsflankon de la mendilo.

Loĝkonfirmoj. Minimume monaton antaŭ la UK vi ricevos konfirmon pri via loĝado, kun detalaj informoj pri via hotelo kaj aliaj kongresaj gravaĵoj.

Prezoj estas en eŭroj (EUR) por unu persono por unu nokto.

Hoteloj kaj aliaj loĝebloj

La plejmulto de la hoteloj ofertataj al la kongresanoj troviĝas je promendistanco de la kongresejo, en agrabla moderna kvartalo. Tiuj kiuj preferas loĝi en unu el la hoteloj kiuj troviĝas iom for de la kongresejo, povas atingi la kongresejon pere de publika transporto, aŭ pere de la ekstreme malmultekostaj pekinaj taksioj. Ĉi-jare estas granda oferto de 3-stelaj hoteloj kun tre favoraj prezoj. Ankaŭ la 4- kaj 5-stelaj hoteloj havas allogajn prezojn. Handikapitoj kun apartaj bezonoj en la ĉambro bv. kontakti la Centran Oficejon antaŭ ol mendi. Bv. noti ke la nombro de ĉambroj en la hoteloj ne nepre egalas al la nombro de ĉambroj kiujn UEA ofertas!

1. Continental Grand Hotel (4★), la oficiala Kongresa hotelo, ĵus renovigita, situas en la Vilaĝo de Azia Sportkunveno. Kun areo de 89 mil kvadrataj metroj, ĝi konsistas el 17-etaĝa kaj 13-etaĝa domoj kaj estas interligita kun la kongresejo per interna koridoro. Luksaj ĉambroj kun ĉiuj facilaĵoj de hotelo en tiu kategorio. Ĝi havas pli ol mil ĉambrojn kaj 20 restoraciojn, kie oni povas ĝui ĉinajn, eŭropajn, japanajn kaj koreajn pladojn. Adreso: Beijing, Andingmenwai, Beichendonglu 8. *Loko en ĉambro: unupersona 89 EUR, dulita 45 EUR.*

2. Crown Plaza Park View Wuzhou Beijing (5★) situas je kvin minutoj piedire de la kongresejo. Ĝi havas 478 luksajn ĉambrojn kaj kompletan komercan servaron. Tie estas ankaŭ drinkejoj, restoracioj ĉin- kaj eŭrop-stilaj, kaj granda festenejo kun mil sidlokoj. Krom tio en la hotelo estas ankaŭ naĝejo, masaĝa saŭno, beligejo kaj diversaj amuzejoj. Adreso: Beijing, Chaoyang-distrikto, Beisihuanzhonglu 8. *Loko en ĉambro: unupersona 93 EUR, dulita 48 EUR.*

3. International Hotel (5★) situas en la komerca parto ĉe Chang'anstrato, Pekino kaj troviĝas je 15 km de la kongresejo, je 20 minutoj taksie. De la Pekina Fervoja Stacio al la hotelo oni bezonas piediri nur dek minutojn. La hotelo, 29-etaĝa, havas luksajn apartamentojn dekoraciitajn laŭ malsamaj stiloj orientaj kaj okcidentaj. Ĝi havas 1049 ĉambrojn unulitajn kaj dulitajn, ĉiuj klimatizitaj. En la hotelo estas televido en fermita cirkvito, bufedo, fridujo ktp. Adreso: Beijing, Jianguomennei 9. *Loko en ĉambro: unupersona 85 EUR, dulita 43 EUR.*

4. Catic Plaza Hotel (3★) situas en la Vilaĝo de Azia Sportkunveno, je kvin minutoj piedire al la kongresejo. La hotelo havas diversajn restoraciojn kaj amuzejojn. Ĝi ankaŭ prizorgas konfidatajn infanojn kaj donas kuracan servon. Adreso: Beijing, Andingmenwai, Beichendonglu 18. *Loko en ĉambro: unupersona 77 EUR, dulita 38 EUR.*

5. Tibet Hotel (3★), je 15 minutoj piedire de la kongresejo. Ĝi havas 206 apartamentojn ekipitajn per centra klimatizado, satelita televido, kaj televido en fermita cirkvito. Tie funkcias diversaj restoracioj, kie ĝueblas ankaŭ tibetaj naciaj kantoj kaj dancoj. Adreso: Beijing, Chaoyang-distrikto, Beisihuandonglu 118. *Loko en ĉambro: unupersona 61 EUR, dulita 30 EUR.*

6. Ya Yun Cun Hotel (3★) situas en la Vilaĝo de Azia Sportkunveno, je dek minutoj piedire de la kongresejo. Ĝi konsistas el 400 apartamentoj ekipitaj per televidilo kaj komputilo kun altrapida konekto. En la ĉambroj oni povas ĝui satelitajn televidajn programojn. Adreso: Beijing, Beisihuanzhonglu 8. *Loko en ĉambro: unupersona 51 EUR, dulita 25 EUR.*

7. Beijing Foreign Experts Building (4★), je 20 minutoj piedire de la kongresejo, havas 192 apartamentojn (kun sidĉambro, dormoĉambro, kuirejo, necesejo kaj duŝejo) kaj 122 hotelĉambroj. Tie estas saŭno, masaĝejo, naĝejo, kafejoj, restoracioj ĉin- kaj eŭrop-stilaj, vendejo, beligejo kaj aliaj servoj. Adreso: Beijing, Chaoyang-distrikto, Beisihuanzhonglu Huayanbeili 8. *Loko en ĉambro: unupersona 50 EUR, dulita 25 EUR. Loko en apartamento: unupersona 61 EUR, dulita 31 EUR.*

8. Grand Hotel Yuanshan (3★) situas en la Vilaĝo de Azia Sportkunveno, sude de la kongresejo kaj de la Ĝardeno de Ĉinaj Etnoj, je kvin minutoj aŭtoveture de la kongresejo. Tie estas sep restoracioj kun ĉinstilaj kaj eŭropstilaj pladoj. La hotelo havas ankaŭ tenisludejojn, sanigan centron, naĝejon, saŭnojn ktp. Adreso: Beijing, Xicheng-distrikto, Deshengmenwai, Yumindongli 20. *Loko en ĉambro: unupersona 46 EUR, dulita 23 EUR.*

9. Cheng Hong Hotel (3★) situas oriente de la Vilaĝo de Azia Sportkunveno, je 20 minutoj piedire de la kongresejo. Ĉambroj kun normalaj individuaj litoj kaj ankaŭ grandmezuraj litoj. Ĝi havas salonon kun 300 sidlokoj kaj kvar kunvenejoj, taŭgaj por komercaj intertraktadoj kaj artaj prezentoj. La restoracio liveras ĉefe Hubei-stilajn pladojn. Adreso: Beijing, Yayuncun, Anhuidongli 17. *Loko en ĉambro kun normalaj litoj: unupersona 46 EUR, dulita 23 EUR. Loko en ĉambro kun unu grandmezura lito: unupersona 44 EUR, dupersona 21 EUR.*

10. Wenbo Plaza (3★) situas ĉe la Vilaĝo de Azia Sportkunveno, je 15 minutoj piedire de la kongresejo. Tie la publika trafiko estas facila. La hotelo havas 84 ĉambrojn, ekipitajn per centra klimatizado, televido en

fermita cirkvito, kaj internacia telefono. En la 17-a etaĝo estas salono kun 150 sidlokoj, kaj en la 5-a kaj 8-a etaĝoj estas po unu kunvenejo kun 30 sidlokoj. Prezo ne inkluzivas matenmanĝon. Adreso: Beijing, Beisihuandonglu, Gaoyuanjie 2 (A). *Loko en ĉambro: unupersona 31 EUR, dulita 15 EUR.*

11. Shengli Hotel (3★) situas ĉe la norda akso de Pekino. Ĝi havas 252 ĉambrojn, inter ili normalaj dulitaj hotelĉambroj kaj ankaŭ kvinlitaj apartamentoj (ĉambro kun du kaj alia kun tri litoj, plus necesejo/duŝejo). En la hotelo estas salono kun 500 sidlokoj, 11 mezgrandaj kaj malgrandaj kunvenejoj, kaj naŭ restoracioj. Unu- kaj dulitaj ĉambroj kun matenmanĝo, kvinlitaj apartamentoj sen matenmanĝo. Adreso: Beijing, Deshengmenwai, Beishatan 3. *Loko en ĉambro: unupersona 28 EUR, dulita 14 EUR, kvinlita apartamento 9 EUR.*

12. Ya Cheng Hotel (3★), situas sudoriente je 30 minutoj piedire aŭ dek minutoj aŭtomobile de la kongresejo. La hotelo povos liveri 20 normajn ĉambrojn kaj 50 tri-litajn ĉambrojn (ekstra lito aldonita al dulita ĉambro), entute 190 litojn. Ĉiuj ĉambroj estas ekipitaj per tualetejo, klimatizilo, televido en fermita cirkvito, kaj fridujo. La hotelo havas restoraciojn ĉinstilan kaj eŭropstilan, komercan centron, kegloludejon kaj kunvenejon. Prezo ne inkluzivas matenmanĝon. Adreso: Beijing, Chaoyang-distrikto, Huixindongjie 21. *Loko en ĉambro: unupersona 21 EUR, dulita 11 EUR, trilita 9 EUR.*

13. Huiyuan Apartment situas en la Vilaĝo de Azia Sportkunveno. Ĝi distancas de la kongresejo je kvin minutoj piedire. Ĝi konsistas el tri 13-etaĝaj, tri 17-etaĝaj kaj du 14-etaĝaj domoj. Tie estas apartamentoj ekipitaj per kuirejo kaj diversaj hejmaj aparatoj. Eblas mendi nur kvar- aŭ sespersonajn apartamentojn, ĉiuj kun individuaj litoj. Proksime de ĝi estas hospitalo, vendejoj kaj amuzejo. Prezo ne inkluzivas matenmanĝon. Adreso: Beijing, Andingmenwai, Beichendonglu 8. *Loko en apartamento: kvarpersona 16 EUR, sespersona 13 EUR.*

14. Nova Dadu Junulara Turisma Servo situas en la okcidenta distrikto de Pekino kun ties facila trafiko. La servo havas klimatizatajn ĉambrojn kun ses kaj ok litoj respektive, entute 320 litoj. Tie estas publikaj duŝejoj, klozetoj, memservaj kuirejoj, vestolavejoj, amuzejoj, publikaj telefonoj ktp. Prezo ne inkluzivas matenmanĝon. Adreso: Beijing, Xicheng-distrikto, Chegongzhuangdajie 21. *Loko por persono: 8 EUR.*

Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

Ĉi-kongrese la oferto de antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj estas granda. Ne povus esti alie en tiel pejzaĝ- kaj kulturriĉa lando. La prezoj estas konsiderinde malaltaj, sed la kvalito estas same alta kiel en antaŭaj Kongresoj. La antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj inkluzivas transporton inter la vizitataj urboj, inkluzive la flugojn. **Bv. atenti ke la antaŭkongresaj ekskursoj povas komenciĝi ne nepre en la urbo kien vi alvenas en Ĉinio, kaj ke la postkongresaj ekskursoj povas ne nepre finiĝi en la urbo de kie vi devas reflugi hejmen! En tiuj kazoj la kongresanoj mem devas aranĝi tiujn flugojn inter la alvenurbo kaj la urbo kie komenciĝas la antaŭkongresa ekskurso, kaj/aŭ la flugon inter la urbo kie finiĝas la postkongresa ekskurso kaj la urbo de kie vi forflugos el Ĉinio.** UEA kaj CITS, la oficiala vojaĝagentejo de la Kongreso, pretas helpi mendi tiujn flugojn se necese. Bv. kontakti UEA en tiuj kazoj.

Pri la ekskursoj:

– Ĉiuj ekskursoj havos minimume dek membrojn. Se estos malpli ol dek membroj, tiam la prezoj altiĝos *aŭ la koncerna ekskurso estos nuligita*, kaj la kongresanoj estos informitaj ĝustatempe pri tio, antaŭ la ekskurso kaj kun la ŝanco ŝanĝi aŭ nuligi.

– Loĝado estos en hoteloj almenaŭ 3-stelaj (aŭ samnivela gastejo) kun matenmanĝoj.

– Tagmanĝoj kaj vespermanĝoj estos servataj en restoracioj por turistoj, laŭ kutima normo por vizitgrupo (la prezo inkluzivas ilin). Sed en Lhasa la tagmanĝo kaj verspermanĝo estos en la hotelo, denove laŭ kutima normo por vizitgrupo.

– **La kosto inkluzivas pagojn por interurba trafikado, flugoj (inkluzive la flughavenajn impostojn), trajno kaj aŭtobuso**, sed *ne* inkluzivas pagon por flugo(j) post la fino de la ekskurso.

– **La antaŭkongresaj ekskursoj ne inkluzivas transporton de la flughavenoj al la hoteloj antaŭ la komenco de la ekskurso (unua tago).** Ĉiuj kongresanoj devas mem aranĝi kaj pagi por tiu transporto! La prezo inkluzivas la transportojn post la komenco de la ekskurso (ekde la dua tago).

– La karavanojn akompanos ĉiĉeronoj de la Ĉina Internacia Turisma Servo kaj Esperanta ĉiĉerono dum la tuta vojaĝo. Turismaj agentejoj de la vizitotaj lokoj disponigos lokajn ĉiĉeronojn.

Vizitotaj urboj kaj vidaĵoj

Changbai-monto, unu el la ok famaj montoj de Ĉinio, rajdanta sur la landlimo inter Ĉinio kaj la Popol-Demokratia Respubliko de Koreio. Ĝi allogas per imponeco, mistereco kaj primitiveco. En la ĉirkaŭa regiono estas la **Ĉiela Lago**, sur la landlimo inter Ĉinio kaj la Popol-Demokratia Respubliko de Koreio. Ĝi estas la plej alta vulkana lago de Ĉinio, kun akvosurfaco kovranta 9,82 kvadratajn kilometrojn. La perimetro de la lago longas je 13,1 kilometroj. Ĝi estas la plej profunda lago de Ĉinio, kun profundeco de 373 metrojn. La **akvofalo,** kiu falas de pli ol 60 metroj, estas formita el la akvo de la Ĉiela Lago, kiu elfluas pli ol 1000 metrojn antaŭ ol iĝi la belega akvofalo, kies laŭtan bruon oni povas aŭdi de tre malproksime. La 13 fontoj de la samloka **termofontaro**, kiuj troviĝas en areo je pli ol 1000 kvadrataj metroj, havas temperaturon de pli ol 60°C. La flukvanto, temperaturo kaj kvalito de ilia akvo restas senŝanĝaj tra la tuta jaro.

Chengdu, ĉefurbo de Sichuan-provinco, nomata en antikveco "Urbo de Brokatoj". Tie la gastoj vizitos antikvan akvoreguligan konstruaĵon Dujiangyan, ekkonstruitan antaŭ 2500 jaroj kaj utiligatan ankoraŭ nun por irigacii 600 mil hektarojn da kampoj.

Chongqing, nova kaj la plej granda municipo de Ĉinio, monturbo situanta ĉe la kunfluejo de Yangzi-rivero kaj ĝia branĉo Jialing; grava industria bazo en la sudokcidento de Ĉinio. Tie oni vizitos Eling-parkon en la urbo kaj telferon super Jialing-rivero.

Dali, fama kultura urbo kun longa historio, kie vivas ĉefe baj-nacianoj. Tie la gastoj vizitos Erhai-lagon en faŭlta stratumo de altebenaĵo; urbeton Xizhou, kun multaj antikvaj loĝdomoj de baj-nacianoj el diversaj dinastioj; miljaran pagodan trion en Chongsheng-templo; kaj antikvan urbon Dali, kies stratoj estis dispoziciitaj laŭ ŝaktabulo.

Dunhuang, 2000-jara urbo, mondfama arta sanktejo en la ĉina provinco Gansu. Tie la gastoj vizitos Sonantan Sablomonton, Lunarkan Fonton, kaj Mogaokavernaron, unu el la kvar famaj ĉinaj budhismaj kavernaroj de skulpturo, 25 kilometrojn sudoriente de Dunhuang, konsistantan el 492 kavernoj faritaj en la tempo de la Norda Wei-dinastio ĝis la Yuan-dinastio (386-1368).

Guilin, ege fama pro belaj montoj, rivero kaj interesa karsta kaverno. Tie la gastoj ŝipveturos sur la rivero Lijiang por ĝui la pejzaĝojn de ambaŭ bordoj, kaj vizitos Ludi-kavernon (kiu profundas 240 metrojn, longas 500 metrojn kaj havas multajn interesajn stalagmitojn kaj stalaktitojn), Monton Elefanta Rostro kaj Diecai-monton.

Hangzhou, fama turisma urbo de Ĉinio, honorata kiel "Paradizo en la Homa Mondo". Tie la gastoj vizitos la Okcidentan Lagon, kiu kun pli ol 40 vidindaĵoj kaj pli ol 30 antikvaj restaĵoj montriĝas kiel akvarelo; Lingying-templon, unu el la 10 famaj budhismaj temploj de Ĉinio; Tigro-fonton; kaj Liuhe-pagodon.

Kunming, honorata kiel “Printempa Urbo” kaj “Flora Urbo”, kun agrabla klimato, ĉiamverda flaŭro kaj floroj tra la tuta jaro. Tie la gastoj vizitos la Drakan Pordegon sur la Okcidenta Monto, 15 kilometrojn sudokcidente de Kunming, de sur kies belvidejo oni povas vidi la tutan urbon; la bronzan taoisman konstruaĵon Ora Kiosko; kaj karstan Ŝtonan Arbaron kun areo de 30 mil hektaroj.

Lhasa, ĉefurbo de Tibeto, kun historio de 1300 jaroj, en absoluta alto de 3600 metroj, konata kiel “Suna Urbo”. En julio la averaĝa temperaturo estas 14,9°C, kaj la loko estas bona somerumejo. Tie la gastoj vizitos Potala-palacon, la plej grandan konstruaĵaron de Tibet-nacio; la parkon Norbu Lingka, rezidejon de Dalai-lamao de multaj generacioj; Zhaibung-templon, plej grandan budhisman monaĥejon en Tibeto, konstruitan en Ming-dinastio (antaŭ ĉirkaŭ 400 jaroj); Sera-templon, konstruitan en Ming-dinastio; Jokhang-templon, miljaran templon enkorpigintan Han- kaj Tibet-naciajn arkitekturojn; kaj Bajiao-straton, movoplenan komercan lokon proksiman al Jokhang-templo.

Lijiang, antikva urbo sub neĝa monto, loĝata de Nashi-nacio. Tie oni vizitos neĝkovritan Yulong-monton en absoluta alteco de 5595 metroj, kie oni vidas modernan oceanan glaciriveron ĉe la suda fino de la norda latitudo; lamaan Yufeng-templon, en kies korto kreskas kamelio de pli ol 500 jaroj; Freskon de Bajsha de antaŭ pli ol 400 jaroj, en pikturaj stiloj de Han-, Tibet- kaj Nashi-nacioj; antikvan urbon Lijiang, riverriĉan urbon sur altebenaĵo, aperintan antaŭ pli ol 1000 jaroj, kie oni povas aprezi ĝiajn antikvajn brikajn domojn; kaj muzikoludon de Nashi-nacia orkestro.

Longjing, la plej frua kaj plej dense loĝata loko de kore-nacianoj en Ĉinio.

Shenyang, ĉefurbo de Liaoning-provinco, estas unu el la pezindustriaj urboj de Ĉinio. Tie troviĝas la alia Imperiestra Palaco de Ĉinio (krom tiu en Pekino). Ĝia konstruado komenciĝis en 1625 kaj finiĝis en 1636. Ĝi estis konstruita kaj uzata de imperiestroj Nurhach kaj Huangtaiji de la Qing-dinastio. Kun 20 kortoj kaj 300 ĉambroj, ĝi havas areon je 60 mil kvadrataj metroj. La Norda Maŭzolearo (tombejo de imperiestro Huangtaiji kaj lia edzino), konstruita en 1651, havas areon je 4,5 milionoj da kvadrataj metroj. Kaj la domo de Marŝalo Zhang Zuolin, loĝejo de tiu militaristo antaŭ 70 jaroj, kovras 16 mil kvadratajn metrojn. Ĝia dika ĉirkaŭmuro el grizaj brikoj altas je pli ol tri metroj; ĝi konsistas el orienta kaj okcidenta kortoj.

Suzhou, unu el la plej gravaj turismaj urboj de Ĉinio. En la urbo estas multaj riveroj kun abundo da ŝtonaj pontoj. Oni nomas la urbon “Hejmloko de Silko”. Aparte famaj estas ĝiaj privataj ĝardenoj antikvecaj kaj delikatstilaj, el kiuj la gastoj vizitos Zhuozheng-ĝardenon.

Ŝanhajo, la plej granda industria kaj komerca bazo kaj havenurbo de Ĉinio kaj ankaŭ paradizo de butikumado. La gastoj vizitos Yuyuan-ĝardenon, privatan ĝardenon de mandareno konstruitan antaŭ ĉirkaŭ 500 jaroj; Templon de Jada Budho, unu el la plej famaj monaĥejoj de Ĉinio, kie estas statuo de kuŝanta Ŝakjamunio kaj sidanta budho el jado; kaj Bordo-promenejon ĉe Huangpu-rivero.

Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero, 192-kilometra parto de Yangzi-rivero ekde la turisma loko Bajdicheng de Fengjie-gubernio en Sichuan-provinco, ĝis Nanjin-pasejo ĉe Yichang, Hubei-provinco. La tri gorĝoj estas Qutang, Wŭia kaj Xiling, kies unikaj belaj pejzaĝoj ege ravas la vizitantojn.

Tumen, urbo ĉe la malsupra parto de Tumen-rivero, la plej granda landlima urbo de Jilin-provinco. Tie oni povas ĝui pitoreskan pejzaĝon de Tumen-rivero, kiu fluas en Ĉinion el la Popol-Demokratia Respubliko de Koreio.

Turpan, 2000-jara urbo sur la Silka Vojo, en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio, la plej varma urbo de Ĉinio. Tie la gastoj vizitos la ruinon de urbo de la antikva regno Gaochang, kiu estis konstruita en la unua jarcento a.K. kaj malaperinta en la oka jarcento p.K.; Milbudhan Kavernon de Pazkrik, budhisman sanktejon de la antikva regno Gaochang; antikvan tombejon de Astana; la ruinon de malaperinta urbo Jiaohe, ĉefurbo de antikva regno Cheshiqian; subteran puton aperintan antaŭ pli ol 2000 jaroj por liveri akvon al la ĉiutaga vivo kaj irigacio; Fajran Monton, 100 kilometrojn longan kaj 9 kilometrojn larĝan, surhavantan neniun herbon; kaj Vinberan Valon en la okcidenta kanjono de la Fajra Monto, produktejon de bongustaj senkernaj blankaj vinberoj.

Urumqi, ĉefurbo de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kie vivas multaj nacimalplimultoj. Tie oni vizitos Nanshan-paŝtejon kaj Ĉielan Lagon, kiu kun neĝaj montoj, prosperaj abioj kaj pinoj kaj herbotapiŝoj estas honorata kiel "Perlo sur Tianshan-montaro".

Xi'an, startpunkto de la Silka Vojo kaj ĉefurbo de 12 dinastioj de Ĉinio. Tie la gastoj vizitos la Terakotajn Militistojn kaj Ĉevalojn ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a.K.), kiu estas konata kiel unu el la mondaj mirakloj; antikvan urbomuron konstruitan antaŭ ĉirkaŭ 400 jaroj, unikan grandan kaj bone konservatan urbomuron en Ĉinio; Dayan-pagodon 64-metran en sep etaĝoj, konstruitan en la sepa jarcento; ruinon Banpo de vilaĝo de tipa matriarka komunumo de la primitiva socio en la baseno de la Flava Rivero antaŭ 6000 jaroj; kaj la Provincan Historian Muzeon.



Xishuangbanna, en la Taj-nacia Aŭtonoma Subprovinco en la sudo de Yunnan-provinco, najbara al Birmo kaj Laoso. Tie estas rezervejo de primitiva tropika arbaro. La gastoj vizitos la Olivan Ebenaĵon, plej malaltan ebenaĵon en Xishuangbanna, kovritan de tropika flaŭro; Ok-angulan Kioskon de Jingzhen, centran templon de suda sekto de budhismo ekkonstruitan en 1701; Drakan Pagodon de Manfei konstruitan en 1204; kaj Arbaran Parkon.

Yanji, ĉefurbo kaj politika, ekonomia kaj kultura centro de la Yanbian-a Korenacia Aŭtonoma Subprovinco de Jilin. La urbo havas 380 mil enloĝantojn, 59% el kiuj estas kore-naciaj.

Zhouzhuang, urbeto 38 kilometrojn sudoriente de Suzhou, havas historion de pli ol 900 jaroj. En la urbeto estas interkruciĝantaj riveretoj en formo de "#". Ambaŭflanke de la riveroj estas vicoj da domoj de urbanoj. Sur la riveroj kuŝas 14 pontoj konstruitaj en la dinastioj Yuan, Ming kaj Qing (1206-1911). Oni nomas la lokon "Unua Akvolando de Ĉinio".

Antaŭkongresoj

A1 Ŝanhajo – Guilin – Xi'an – Pekino

18-23 julio 2004 *5 noktoj kaj 6 tagoj*

Dimanĉo, 18/07 Alveno al Ŝanhajo kaj enloĝiĝo en 3-stela Swan-hotelo. Ĉiĉerono kontaktiĝos kun la gastoj en la hotelo kaj informos pri la tagordo de la vizitgrupo. Adreso: Swan Hotel, 2211, North Sichuan Road, Ŝanhajo. Telefono: (021) 5666 5666.

Lundo, 19/07 Vizito al Yuyuan-ĝardeno, Templo de Jada Budho kaj la Bordo-promenejo ĉe Huangpu-rivero. Flugo al Guilin en vespero, enloĝigo en 3-stela Huanqiu-hotelo.

Mardo, 20/07 Ŝip-ekskurso sur Lijiang-rivero kaj vizito al la Monto Elefanta Rostro.

Merkredo, 21/07 Vizito al Ludi-kaverno kaj Diecai-monto. Flugo de Guilin al Xi'an posttagmeze kaj tranokto en 4-stela Xi'an-hotelo.

Ĵaŭdo, 22/07 Vizito al la Terakotaj Militistoj kaj Ĉevaloj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, la ruino Banpo kaj Dayan-pagodo. Rigardo al kortega varieteo de Tang-dinastio en vespero.

Vendredo, 23/07 Matena vizito al antikva urbomuro kaj al la Provinca Historia Muzeo. Flugo al Pekino posttagmeze. Transporto al hoteloj kaj fino de la ekskurso.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 820 EUR, dulita 700 EUR.

A2 Ŝanhajo – Zhouzhuang – Suzhou – Hangzhou – Pekino

18-23 julio 2004 *5 noktoj kaj 6 tagoj*

Dimanĉo, 18/07 Alveno al Ŝanhajo kaj enloĝiĝo en 3-stela Swan-hotelo. Adreso: Swan Hotel, 2211, Norda Sichuan-strato, Ŝanhajo. Telefono: (021) 5666 5666. Ĉiĉerono kontaktiĝos kun la gastoj kaj informos pri la tagordo de la vizitgrupo.

Lundo, 19/07 Vizito al Templo de Jada Budho, Yuyuan-ĝardeno, Bordo-promenejo ĉe Huangpu-rivero; vespera programo de akrobataĵoj.

Mardo, 20/07 Veturo de Ŝanhajo al Zhouzhuang, vizito en la urbo kaj foriro al Suzhou. Tranokto en 4-stela Yadu-hotelo.

Merkredo, 21/07 Vizito al Tigro-monto kun miljara pagodo oblikviĝinta antaŭ 400 jaroj, Zhuozheng-ĝardeno kaj Hanshan-templo.

Ĵaŭdo, 22/07 Busveturo al Hangzhou kaj ekskurso ĉe la Okcidenta Lago; tranokto en 4-stela Wanghu-hotelo.

Vendredo, 23/07 Vizito al Liuhe-pagodo, Botanika Ĝardeno kaj Tigro-fonto, flugo al Pekino en posttagmezo aŭ vespero. Transporto al hoteloj kaj fino de la ekskurso.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 545 EUR, dulita 440 EUR.

A3 Kunming – Dali – Lijiang – Xishuangbanna – Kunming – Pekino

15-23 julio 2004 *8 noktoj kaj 9 tagoj*

Ĵaŭdo, 15/07 Alveno al Kunming. Ĉiĉerono kontaktiĝos kun la gastoj en la vespero kaj informos pri la tagordo de la vizitgrupo. Tranokto en 4-stela Kunming-hotelo. Adreso: 52 East Dongfang Road, Kunming 650011. Telefono: (0871) 3162063.

Vendredo, 16/07 Tuttaga vizito al Ŝtonarbaro kaj Ora Templo.

Sabato, 17/07 Flugo al Lijiang en mateno. Vizito al la neĝa monto Yulong; varieteo de nacimalplimultanoj kaj Baishan-fresko. Tranokto en 4-stela turista hotelo.

Dimanĉo, 18/07 Vizito al la malnova urbo Lijiang antaŭtagmeze. Busveturo al Dali en posttagmezo. Tranokto en 4-stela Yaxing-hotelo.

Lundo, 19/07 Vizito al Erhai-lago, la Tri Pagodoj, urbo Dali kaj popola loĝejo de baj-nacio en Xizhou. Tranokto en Yaxing-hotelo.

Mardo, 20/07 Flugo de Dali al Xishuangbanna matene. Vizito al Tropika Botanika Ĝardeno kaj Taj-nacia vilaĝo Mandou. Tranokto en 4-stela Taiyuan-hotelo.

Merkredo, 21/07 Busveturo al la Okangula Kiosko kaj vizito al Hani-nacia vilaĝo survoje.

Ĵaŭdo, 22/07 Vizito en urbo Xishuangbanna: Manting-Parko kaj Parko de ĉinaj etnoj. Flugo al Kunming en vespero. Tranokto en 4-stela Kunming-hotelo.

Vendredo, 23/07 Vizito al la Okcidenta Monto kaj Draka Pordego matene. Posttagmeze flugo de Kunming al Pekino. Transporto al hoteloj kaj fino de la ekskurso.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 990 EUR, dulita 880 EUR.

A4 Shenyang – Yanji – Changbai-monto – Yanji – Pekino

20-23 julio 2004 *3 noktoj kaj 4 tagoj*

Mardo, 20/07 Alveno al Shenyang. Tranokto en 4-stela New World Hotel. Adreso: 2 South Nanjing Road, Shenyang 110001. Telefono: (024) 2386 9888.

Merkredo, 21/07 Vizito al la Imperiestra Palaco kaj la Norda Maŭzolearo de Qing-dinastio kaj la domon de marŝalo Zhang Xueliang. Flugo al Yanji-urbo vespere. Tranokto en Baishan-hotelo.

Ĵaŭdo, 22/07 Kvinhora, 280-kilometra aŭtoveturo al Changbai-monto. Vizito al la Ĉiela Lago, subĉiela termofonto kaj akvofalo. Tranokto en Baishan-hotelo.

Vendredo, 23/07 Busveturo al Yanji, kun vizito survoje al Longjing-vilaĝo, la plej frua loĝejo de kore-nacianoj en Ĉinio; landlimo inter Ĉinio kaj la Popola Demokratia Respubliko de Koreio, ĝuado de pejzaĝo de Tumen-rivero. Flugo al Pekino en vespero. Transporto al hoteloj kaj fino de la ekskurso.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 480 EUR, dulita 390 EUR.

Postkongresaj ekskursoj

P1 Pekino – Xi'an – Guilin

01-04 aŭgusto 2004 *3 noktoj kaj 4 tagoj*

Dimanĉo, 01/08 Flugo de Pekino al Xi'an. Antaŭ enhoteliĝo vizito al Dayan-pagodo kaj antikva urbomuro. En vespero rigardo al kortega varieteo de Tang-dinastio.

Lundo, 02/08 Vizito al la Terakotaj Militistoj kaj Ĉevaloj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, kaj ruino Banpo.

Mardo, 03/08 Flugo de Xi'an al Guilin. Vizito al Ludi-kaverno kaj Diecai-montoj. Enloĝiĝo en 3-stela hotelo.

Merkredo, 04/08 Tuttaga ekskurso. Sur Lijiang-rivero ĝis Yangshuo ŝipe, vizito al la Monto Elefanta Rostro kaj reveno al Guilin aŭtobuse. Vespere transporto al la flughaveno kaj fino de la ekskurso.

Noto: Guilin havas regionajn flugojn al Honkongo kaj Makao kaj internaciajn flugojn al Seulo kaj Fukuoka. Se vi flugas al/el Ĉinio tra Honkongo tiu ĉi ekskurso povas taŭgi al vi.

Prezoj: Loko en ĉambro: unulita 555 EUR, dulita 495 EUR.

P2 Pekino – Xi'an – Dunhuang – Turpan – Urumqi – Pekino

01-09 aŭgusto 2004 *8 noktoj kaj 9 tagoj*

Dimanĉo, 01/08 Flugo de Pekino al Xi'an en frua mateno. Vizito al Dayan-pagodo kaj la antikva urbomuro en posttagmezo. Vespermanĝo kun spektado al Tang-dinastia spektaklo. Tranokto en 4-stela Xi'an-hotelo.

Lundo, 02/08 Vizito al la Terakotaj Militistoj kaj Ĉevaloj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, kaj la ruino Banpo. En vespero, kortega varieteo de Tang-dinastio.

Mardo, 03/08 Flugo de Xi'an al Dunhuang en frua mateno. Vizito al la Sonanta Sablomonto kaj al la Duonluna lago. Tranokto en 4-stela Taiyang Grand Hotel.

Merkredo, 04/08 Vizito al Mogao-kavernaro. Trajnveturado al Turpan dum la nokto kaj atingo al Turpan en la sekva mateno.

Ĵaŭdo, 05/08 Vizito al la Milbudha Kaverno, ruino de antikva urbo de Gaochang-regno kaj antikva tombejo de Astana. Tranokto en la 3-stela Silk Road Oasis Hotel.

Vendredo, 06/08 Vizito al la ruino de antikva urbo Jiaohe, subtera puto, Fajra Monto kaj Vinbera Valo. Aŭtobusa veturado al Urumqi en post-tagmezo. Alveno kaj tranokto en 5-stela Hongfu-hotelo.

Sabato, 07/08 Vizito al la Ĉiela Lago kaj Nanshan-paŝtejo.

Dimanĉo, 08/08 Flugo al Pekino. Enhoteliĝo en 3-stela Catic Plaza Hotel. Libera tago.

Lundo, 09/08 Ĉiĉerona servo finiĝos post matenmanĝo en la hotelo. La ekskursanoj mem zorgas pri siaj veturoj al flughaveno laŭ propraj deziro kaj konveno.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 1245 EUR, dulita 1095 EUR.

P3 Pekino – Chengdu – Chongqing – La Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero – Yichang – Ŝanhajo

01-07 aŭgusto 2004 *6 noktoj kaj 7 tagoj*

Dimanĉo, 01/08 Matena flugo de Pekino al Chengdu. Vizito al la antikva akvoreguliga konstruaĵo Dujiangyan. Tranokto en 4-stela Minshan-hotelo.

Lundo, 02/08 Flugo de Chengdu al Chongqing. Vizito al la Gravurita Valo de Dazhu. Tranokto en krozŝipo sur Yangzi-rivero. *Sur la ŝipo ne eblas havi unulitan ĉambron. Esceptoj devas esti aranĝitaj surloke rekte kun la ŝipestro.*

Homoj kiuj mendas unulitajn hotelĉambrojn devas dividi la ĉambron en la ŝipo kun alia persono.

Mardo, 03/08 Krozo de Chongqing laŭ Yangzi-rivero tra la Tri Gorĝoj komenciĝas en tiu ĉi mateno.

Merkredo, 04/08 Krozo: vizito al la akvobaraĵo de la akvorezervejo de la Hidroelektra Centralo Sanxia en posttagmezo.

Ĵaŭdo, 05/08 Elŝipiĝo ĉe urbo Yichang en mateno kaj ekskurso en la urbo. Flugo al Ŝanhajo en posttagmezo. Tranokto en 3-stela Swan-hotelo.

Vendredo, 06/08 Vizito al la Templo de Jada Budho, Yuyuan-ĝardeno, Bordo-promenejo ĉe Huangpu-rivero; vespera programo de akrobataĵoj.

Sabato, 07/08 Post matenmanĝo en la hotelo la ekskurso finiĝas. Ĉiuj mem zorgas pri veturo al flughaveno.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 1050 EUR, dulita 990 EUR.

P4 Pekino – Chengdu – Lhasa – Chengdu

01-07 aŭgusto 2004 *6 noktoj kaj 7 tagoj*

Dimanĉo, 01/08 Flugo de Pekino al Chengdu. Vizito al antikva akvoreguliga konstruaĵo Dujiangyan. Tranokto en 4-stela Minshan-hotelo.

Lundo, 02/08 Flugo al Lhasa matene. Ripozo tutan tagon en la hotelo por alkutimiĝi al la klimato de la altebenaĵo. Tranokto en 4-stela Lhasa-hotelo.

Mardo, 03/08 Lhasa: Vizito al Potala-palaco, Jokhang-monaĥejo kaj Barkhon-strato.

Merkredo, 04/08 Lhasa: Vizito al la monaĥejoj Drepung kaj Sera kaj al tapiŝofabriko.

Ĵaŭdo, 05/08 Lhasa: Vizito al parko Norbu Lingka, hospitalo de tibeta medicino kaj Gandain-monaĥejo.

Vendredo, 06/08 Reflugo al Chengdu, vizito al Panda Esplorcentro kaj la Provinca Muzeo. Tranokto en 4-stela Minshan-hotelo.

Sabato, 07/08 Post matenmanĝo en la hotelo finiĝas la ekskurso. Ĉiuj zorgas mem pri transporto al la flughaveno.

Sugesto: UEA/CITS povas helpi aranĝi flugon al Honkongo aŭ aliaj urboj en Ĉinio post la fino de la ekskurso en Chengdu, se vi mendas frue! Bv. kontakti la Centran Oficejon de UEA.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 1485 EUR, dulita 1195 EUR.

Dumkongresaj ekskursoj

Kiel mendi ekskursojn?
Bonvolu atente tralegi la priskribojn kaj elekti. Post la elekto, plenigu klare kaj atente (preslitere) la koncernan parton de la mendilo, kaj sendu ĝin samtempe kun via pago al Roterdamo (ĉinoj al la ĉina peranto). Se en via lando estas Kongresa peranto, vian mendon kaj pagon vi povas sendi al tiu. Por malmendoj validas la kondiĉoj presitaj dorsflanke sur la mendilo. Bv. ĉiam sendi la mendilon kaj pagon al la sama adreso, t.e. instanco.

Ĝeneralaj kondiĉoj
Ĉar ĉiuj ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizanto rezervas al si la rajton eventuale nuligi iujn ekskursojn, pri kio ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la Kongreso, kun propono pri eblaj alternativoj.

Ĉiuj ekskursoj startas de la kongresejo, kaj revenas tien. Klopodu veni dek kvin minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos E-lingvaj interpretistoj. Ili ne estas profesiaj ĉiĉeronoj sed nur bonvolaj helpantoj, do bv. indulgi ilin per pacienco kaj samideana komprenemo, komprenante ke ili faros sian plejeblon por bone servi al vi. Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (EUR).

Ĉe la registriĝo en la kongresejo, ĉiuj mendintoj ricevos, kun la kongresaj dokumentoj, koverton kun la menditaj Kongresaj biletoj. Sur la biletoj estos bazaj informoj pri la ekskurso (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj presitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj sur la biletoj. Ne forgesu preni ŝirmilojn kontraŭ suno kaj varmo! Bv. noti ke la tereno en kelkaj ekskursoj povas esti netaŭga por homoj kun marŝhandikapoj; la priskriboj de la ekskursoj kutime mencias tion.

La prezoj inkluzivas: ĉiĉeronadon de loka turisma servo kaj E-lingva ĉiĉerono, vojaĝadon per bonkvalitaj busoj, enirbiletojn por la vizitataj lokoj, kaj tagmanĝojn dum la tuttagaj ekskursoj (tamen ne trinkaĵojn).

Tuttagaj ekskursoj

La tuttagaj ekskursoj okazos precipe en merkredo, la 28-a de julio, sed ankaŭ en aliaj tagoj. La prezoj inkluzivas tagmanĝon. Ĉiuj aŭtobusoj estas altkvalitaj kaj klimatizataj.

E1 La Granda Muro ĉe Badaling kaj Dingling-maŭzoleo

Mardo kaj merkredo Ekiro: 08h30 Reveno: ĉ. 17h00 Prezo: 37 EUR

La Granda Muro estas unu el la plej grandaj kaj antikvaj konstruaĵoj de la mondo. Ĝi longas entute 6700 km. La parto ĉe Badaling kun longo de 3741 metroj konstruiĝis en 1505; ĝi estas la plej bone konservata parto de la Granda Muro de Ming-dinastio. Strategie lokite, ĝi estas ege fortika kun multaj fortresoj.

Dingling-maŭzoleo estas tombo de imperiestro Shenzong kaj liaj du edzinoj de la Ming-dinastio. Ĝiaj konstruaĵoj konsistas el maŭzolea pordego, haloj, turo kaj subtera palaco. Ĝi situas en regiono de la 13 imperiestraj tomboj, la Ming-tomboj.

E2 Tianjin

Ekiro: 08h30 *Reveno: ĉ. 17h00* *Prezo: 30 EUR*

Tianjin estas tre granda urbo je du horoj aŭtoveture de Pekino. Ĝi estas fama historia urbo kaj ankaŭ grava loko de norda kulturo. Ĝi estas abunda je popolaj metiartaĵoj. Ni vizitos la budhisman monaĥejon Dabei, la Tamburan Turon, kaj kulturajn kaj manĝstratojn kie ni povos ĝui diversajn manĝaĵetojn kun loka gusto.

E3 Orientaj Maŭzoleoj de Qing-dinastio

Merkredo kaj vendredo Ekiro: 08h30 Reveno: ĉ. 17h00 Prezo: 39 EUR

En urbo Zunhua de Hebei-provinco kuŝas la plej granda kaj bone konservata maŭzolearo de la Qing-dinastio. Ĝi kovras entute 74 kvadratajn kilometrojn. Tie kuŝas 15 maŭzoleoj de imperiestroj kaj imperiestraj edzinoj. Ĝia arkitekturo atingis kulminon de la antikva ĉina arkitekturo bazita sur la principoj de Feng Shui. Tie vidiĝas tri grandaj haloj en la Maŭzoleo de la Imperiestra Patrino Cixi, Maŭzoleo de imperiestro Qianlong (honorata kiel trezorejo de ŝtona skulpturo), subtera budhisma halo, kaj ŝtona arkaĵo, la plej larĝa en Ĉinio.

E4 Tanzhe-templo kaj Shihua-groto

Merkredo kaj ĵaŭdo Ekiro: 08h30 Reveno: ĉ. 17h00 Prezo: 32 EUR

Tanzhe-templo estis konstruita en 265-316 p.K. Ĝi estas la vidindaĵo kun la plej longa historio de Pekino. La nuna templo Tanzhe estas heredaĵo de la dinastioj Ming kaj Qing, kaj konsistas el diversaj pavilonoj, preĝhaloj, kortoj kaj grupo de pagodoj. Ĝi, laŭ la montodeklivo, aspektas tre impone inter tre maljunaj pinoj kaj cipresoj.

Shihua-groto, 50 km for de Pekino, estas tipa karsta groto en norda Ĉinio. La groto havas sep etaĝojn. De la unua ĝis la kvina etaĝoj la longeco estas pli ol kvin mil metrojn, kaj en la sesa kaj sepa etaĝoj estas subteraj riveroj. La pejzaĝoj estas diversspecaj kaj kuriozaj. Altaprezata, ĝi estas populara ankaŭ inter sciencesploristoj. Inter la stalaktitoj, kiuj havas interalie bestformojn, troviĝas ankaŭ formo de florbrasiko, unikaĵo en Ĉinio.

E5 Hongluo-templo kaj la Granda Muro ĉe Mutianyu

Ekiro: 08h30 *Reveno: ĉ. 17h00* *Prezo: 40 EUR*

La templo Hongluo troviĝas 50 km for de Pekino. Ĝi konstruiĝis en 378 kaj ekspansiiĝis dum la Tang-dinastio. Historie ĝi estis budhisma sanktejo, loko de pilgrimado fare de japanaj kaj sudorientaziaj budhistoj, kaj lulilo de ĉina *chigong*-o, multe honorigita fare de malnovepokaj imperiestroj. Oni nomas ĝin la unua budhisma templo norde de Pekino.

La Granda Muro ĉe Mutianyu troviĝas je 70 km nordoriente de Pekino, inter profundaj valoj kaj krutaj monteĝoj. La parto de la muro tie ĉi, kun longo je tri mil metroj, havas sur si 20 gvatturojn kaj estas unika pro siaj fortikaĵoj, kaj konsilinda por tiuj kiuj volas eviti la homamason ĉe la Badaling-parto.

Duontagaj ekskursoj

D1 Imperiestra Palaco kaj Tian'anmen-placo

Tagoj: sabato, dimanĉo kaj lundo posttagmeze (13h30-17h00), mardo matene (08h30-12h00) *Prezo: 19 EUR*



La Imperiestra Palaco, en la centro de Pekino, estas nomata ankaŭ **la Malpermesita Urbo**. Kun areo je 720 mil kvadrataj metroj kaj preskaŭ dek mil ĉambroj, ĝi konstruiĝis en 1406 dum la Ming-dinastio, ĝi loĝigis 24 imperiestrojn de la dinastioj Ming kaj Qing. Ĝi estas la plej granda kaj plej bone konservata antikva konstruaĵaro de Ĉinio. Antaŭ ĝia suda pordo troviĝas Tian'anmen-placo, kiu havas entute 440 mil kvadratajn metrojn kaj estas la plej granda placo en la mondo.

D2 *Hutong*-oj kaj Princdomo de Gongwang

Tagoj: mardo posttagmeze (13h30-17h00), dimanĉo kaj ĵaŭdo matene (08h30-12h00) *Prezo: 20 EUR*

Ekskurso al la *hutong*-oj de Pekino (malnovaj mallarĝaj stratoj) impresos vin. Vi havos ideojn pri kiel vivis ordinaraj ĉinoj en la malnova Pekino, kaj ankaŭ vidos kia estas la tradicia vivo de la pekinanoj nuntempe. Vi iros unue al la Tambura Turo pere de pedal-triciklo por havi superrigardon de la loko, kaj poste piedeniros la *hutong*-ojn. Post la promenado vi vizitos la princdomon de Gongwang, kiu situas ĉe la norda bordo de Shicha-lago kaj estas la plej granda kvadrata korto de Ĉinio. Ĝi enhavas pli ol 20 vidindajn lokojn en oficdomo, korto kaj ĝardeno.

D3 Ĉiela Altaro kaj Tian'anmen-pordego

Tagoj: dimanĉo kaj ĵaŭdo posttagmeze (13h30-17h00), mardo matene (08h30-12h00) *Prezo: 18 EUR*

La Tian'anmen-pordego estas simbolo de la Ĉina Popola Respubliko. Konstruita en 1417 dum la Ming-dinastio, ĝi estas la loko kie la kortego proklamis siatempe dekreton pri surtroniĝo de imperiestroj kaj nomumo de imperiestraj edzinoj. Ĝi estis konstruita kun la celo esti la ĉefa eniro al la



Malpermesita Urbo. En 1949 prezidento Mao Zedong deklaris tie la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko. De sur la turo oni havas bonan vidon al la tuta placo kaj ĉirkaŭaj imponaj konstruaĵoj.

La Ĉiela Altaro estas la plej granda kulta konstruaĵaro en la antikva Ĉinio. Ĝi konstruiĝis en 1420 dum la Ming-dinastio kaj funkciis kiel preĝejo de la imperiestroj de la Ming- kaj Qing-dinastioj por peti riĉan rikolton. La ĉefaj vidindaĵoj estas Ronda Altaro, Preĝa Halo kaj Ĥa Muro. En 1998 Unesko deklaris ĝin kultura heredaĵo de la homaro.

D4 Somera Palaco kaj Bestoĝardeno

Tagoj: dimanĉo, ĵaŭdo kaj vendredo matene (08h30-12h00), mardo posttagmeze (13h30-17h00) *Prezo: 21 EUR*

La Somera Palaco troviĝas je 15 km for de la urbocentro de Pekino. Konstruita en 1750, ĝi origine estis provizora imperiestra palaco kun ĝardenaro. En 1888 la Imperiestra Patrino Cixi donis al ĝi la nunan nomon. La palaco konsistas el Wanshou-monto, Kunming-lago, Foxiang-pavilono kaj aliaj eroj. La ĝardenistika dispozicio montras la grandajn sukcesojn de la ĉinaj ĝardenoj kaj okupas altan lokon en la ĝardenistika historio de la mondo. Rava loko kaj malfacile forgesebla, ĝi estis deklarita kultura heredaĵo de la homaro de Unesko en 1998.

La Pekina bestoĝardeno estis imperiestra farmejo de la Ming-dinastio. En 1955 fondiĝis tie la Pekina Zoo kun plankareo de 50 mil kvadrataj metroj. En la ĝardeno vivas rinoceroj, leonoj, tigroj, elefantoj, pandoj, nordorientaj tigroj kaj orharaj simioj, entute pli ol 500 specoj de bestoj.

D5 Yonghe-lamaejo kaj Konfucea Templo

Tagoj: mardo kaj ĵaŭdo posttagmeze (13h30-17h00) *Prezo: 17 EUR*

La Yonghe-lamaejo estas la plej granda lamaa templo en Pekino, kie imperiestroj de la Qing-dinastio kultis siatempe la prapatrojn. Ĝi kombinas la hanan, manĉuan, mongolan kaj tibetan arkitekturajn stilojn. Ĝiaj ĉefaj vidindaĵoj estas la Ekranmuro, Ĉielreĝa Halo, Darmo-rada Halo kaj Wanfu-pavilono.

La Konfucea Templo estis destinita por kulti Konfuceon en la dinastioj Yuan, Ming kaj Qing. Ĝi konstruiĝis en 1302. Nun ĝi estas la ĉefurba muzeo, kie vi vidos grandnombrajn valorajn historiajn restaĵojn kaj dokumentojn de Pekino inter aliaj 80 mil historiaj objektoj.

D6 Xiangshan-parko kaj Templo de Kuŝanta Budho

Tagoj: dimanĉo kaj vendredo matene (08h30-12h00) *Prezo: 16 EUR*

Xiangshan-parko, ĉ. 30 km for de la urbocentro de Pekino, troviĝas en la Okcidenta Montaro de Pekino. La loko estas unu el la plej preferataj de pekinaj familioj kiel ripozejo. En la parko troviĝas 28 vidindaĵoj, inter temploj, pavilonoj kaj pagodoj konstruitaj dum diversaj dinastioj.

La Templo de Kuŝanta Budho konstruiĝis antaŭ pli ol mil jaroj kaj estis riparita en 1734. En la halo kuŝas kupra budha statuo, kvin metrojn longa, kun la dekstra mano subtenanta la kapon kaj la maldekstra brako etendita. Malantaŭe staras 12 argilaj budhaj statuoj. La tuto montras la ĉefan Budhon, Ŝakjamunio, testamentantan al siaj disĉiploj ĉe la nirvano.

D7 Lugou-ponto

Tagoj: lundo kaj vendredo posttagmeze (13h30-17h00), mardo matene (08h30-12h00) *Prezo: 15 EUR*

La Lugou-ponto, konata ankaŭ kiel **la Marko-Polo-ponto,** kuŝas super Yongding-rivero, 15 km sudokcidente de Pekino. Konstruita en 1189, ĝi estas 266,5 m longa kaj 7,5 m larĝa, kaj havas sur siaj balustroj 485 ŝtonajn leonojn divers-pozajn. Marko Polo skribis en siaj vojaĝ-notoj ke ĝi estas “la plej bona ponto en la mondo”. Nepre vizitinda loko!

D8 Kultura strato Liulichang

Tago: vendredo matene (08h30-12h00) *Prezo: 11 EUR*

Malnova kaj nova, aŭtentika kaj neaŭtentika, morala kaj malmorala, ĉio estas trovebla en la strato Liulichang. Situante en la sudokcidenta parto de Pekino kaj longante je 750 metroj, ĝi estas unu el du stratoj kiuj ankoraŭ havas la aspekton de bazara strato dum la epoko de la Qing-dinastio (la alia estas la strato Suzhou ĉe la Somera Palaco, kie ne okazas tiom da vera komercado). En la okdekaj jaroj, la strato estis renovigita kaj diversaj specialaĵaj butikoj rekonstruitaj. Kun hele farbitaj pordoj kaj domo-randoj, kaj kun gracie kurbaj tegmentoj el nigraj tegoloj, iom de la malnova vivstilo de Pekino restas tie ĉi konservita. Tie staras multe da butikoj de antikvaĵoj, ĉin-stilaj pentraĵoj, kaligrafaĵoj kaj kopiaĵoj faritaj ĉe antikvaj steleoj. La famaj Rongbaozhai-butiko, Ĉina Librovendejo kaj Vendejo de Historiaj Artaĵoj estas tie. Bela strato, ĝi estas vizitinda ne nur de art-amantoj.

Semajna skemo de ekskursoj

T = tuttaga ekskurso (08h30-17h00); M = duontaga ekskurso matene (08h30-12h00); P = duontaga ekskurso posttagmeze (13h30-17h00)

	sab24/7	dim25/7	lun 26/7	mar 27/7	mer 28/7	ĵau 29/7	ven 30/7	prezo
E1				T	T			37 EUR
E2					T			30 EUR
E3					T		T	39 EUR
E4					T	T		32 EUR
E5					T			40 EUR
D1	P	P	P	M				19 EUR
D2		M		P		M		20 EUR
D3		P		M		P		18 EUR
D4		M		P		M	M	21 EUR
D5				P		P		17 EUR
D6		M					M	16 EUR
D7			P	M			P	15 EUR
D8							M	11 EUR

Bankedo

La ĉina bankedo, ĉe ronda tablo, havas enir- kaj ĉefpladojn kaj deserton, metatajn unu post la aliaj. La bankedanoj elektas tion, kion ili volas manĝi kaj ankaŭ ĝian kvanton, prenante de la pladoj kiuj kuŝas sur turniĝanta parto de la tablo. Vi povas manĝi per bastonetoj, aŭ, se vi preferas, forko kaj tranĉilo. Krom la delicajn manĝaĵojn, la prezo inkluzivas ankaŭ unu botelon de ruĝa vino sur ĉiu tablo, gas-trinkaĵon (kolaon), bieron, mineralan akvon, sukojn (oranĝan, poman kaj pampelmusan), kafon kaj teon.

Menuo

Sep specoj de malvarmaj pladoj
Acid-akra supo el sepi-ovoj
Brezita halioto kun legomoj
Frititaj freŝaj salikoketoj kun fruktoj
Fritita loligo kun dolĉpika saŭco "xo"
Frititaj tranĉaĵoj de bovaĵo kun nigra pipro kaj saŭco
Vaporumita mandarena fiŝo
Dongpo-a femuraĵo kun legomoj
Rostita pekina anaso
Frititaj fazeoletoj kun lardumita porkaĵo
Rizo fritita kun salikoketoj
Ĉinaj kukoj
Freŝaj fruktoj

Menuo por vegetaranoj

Supo el aromaj fungoj kaj legomoj
Blankaj fungoj brezitaj en bruna sojo
Fritita tranĉita giromitro
Frititaj fungoj kun peklita kapsiko
Kampa agariko kun legomoj
Salato el maizŝosoj, karotoj kaj lentoj
Frititaj dolĉaj faboj
Fritita toŭfuo kun giromitro kaj bambu-ŝoso
Ĉinaj kukoj
Fritita rizo kun sezonaj legomoj
Freŝaj fruktoj

Prezo: 45 EUR

Provizora programo

Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

Sabato, 24 julio. Malfermo de la kongresejo je 09h00. Alveno de kongresanoj kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Loĝigo. Komitato de UEA. Unuafojaj kongresanoj (18h00). Artistoj. Libroservo. Interkona Vespero (20h00). Giĉetoj funkcias ĝis la 20h00.

Dimanĉo, 25 julio. Unuafojaj Kongresanoj. Ekumena Diservo. Kongresa Temo. Ĉina Eksprese. Libroservo. Nacia Vespero.

Lundo, 26 julio. Solena Malfermo (10h00). Inaŭguro de IKU/AIS. ILEI. Cseh-kurso. Ekzamenoj (registriĝo kaj antaŭtesto). Libroservo. Bankedo. Balo.

Mardo, 27 julio. Tago de la Lernejo. IKU. Kongresa Temo. Ĉina Eksprese. IKEL. Ekzamenoj (skribaj). Estraro Respondas. Landa Agado. Komitato. IKEF. Delegita Reto. Libroservo. Teatro.

Merkredo, 28 julio. Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

Ĵaŭdo, 29 julio. Tago de la Libro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Belartaj Konkursoj. Cseh-kurso. Ekzamenoj (parolaj). Ĉina Eksprese. CO Respondas. Urbestra Akcepto (por invititoj). Libroservo. Koncerto.

Vendredo, 30 julio. IKU-prelegoj. Cseh-kurso. Fakaj Asocioj. Aŭkcio. Ĉefdelegitoj kaj Perantoj. Venonta UK. Libroservo. Internacia Arta Vespero.

Sabato, 31 julio. Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis 14h00). Fermo de la kongresejo (14h00).

Programeroj dum UK

Cseh-kurso. "Zamenhof kreis la lingvon kaj Cseh la metodon por instrui ĝin", oni kutime diras rilate al Esperanto. Jen, do, ŝanco konatiĝi kun la fama metodo iniciatita de Andreo Cseh kaj uzita de elstaraj instruistoj de nia E-historio kiel Hendrik Seppik, Julio Baghy, Sigismundo Pragano, Lidja Zamenhof kaj aliaj. La kurso estas destinita al komencantoj, kaj ĝin gvidos Ewa Bondar el Pollando. La partopreno en la kurso estas aparte pagenda. La kotizo estas 50,00 EUR por enloĝantoj en landoj de kategorio A kaj 37,50 EUR por enloĝantoj en landoj de kategorio B. Detalaj informoj kaj aliĝilo estas riceveblaj ĉe la organizanto: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; iei001@tiscali.nl.

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA. Dum la UK okazos la Internaciaj Ekzamenoj pri Esperanto je elementa kaj meza niveloj. La ekzamenoj konsistas el tri partoj: gramatika antaŭtesto, skriba parto kaj parola parto. Nur sukcesintoj en la gramatika antaŭtesto rajtas partopreni la skriban parton de la ekzameno kaj, atinginte en tiu skriba parto la sukceslimon de 60 poentoj, la parolan parton. Pro praktikaj kialoj maksimume 24 kandidatoj povos ekzameniĝi. Pro tio, anticipa sinanonco estas konsilinda. Anoncu vin, prefere antaŭ la 15-a de junio 2004, ĉe la sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) (P.O. Box 36, Powhatan VA 23139, Usono; ☎+1 804 598 3050, 🖷+1 804 598 5608, 🖳bmaxey@visi.net), kaj samtempe pagu la speciale favoran ekzamenkotizon (40% de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato) al UEA-konto ilek-a. Kaze de neprezentiĝo aŭ nesukceso en la antaŭtesto, oni rericevos 50% de la pagita kotizo. Se la maksimuma nombro de ekzamenotoj ne jam estos atingita, eblos sin anonci surloke ĉe la ILEI-budo en dimanĉo. Tiam la ekzamenkotizo estos 60% de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato. Oni aparte atentigas UEA-delegitojn pri la rekomendo de la Estraro de UEA, ke la delegitoj "atingu almenaŭ la nivelon de la meza ekzameno". Simile, laŭ la regularo pri la nova ILEI/UEA-ekzameno pri instrukapablo, "kandidatoj devas posedi Esperanton minimume ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA". Detalajn informojn pri la ekzamenoj, inkluzive de specimenaj testoj, oni trovas en la *Gvidilo al Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA* (2-a eld., elĉerpita sed baldaŭ reeldonota). Bazaj informoj pri la ekzamenoj kaj specimenaj testoj troviĝas ankaŭ ĉe http://www.edukado.net/ekzilei.jsp.

Konversaciaj Rondoj. Paroligaj kursoj kun http://www.edukado.net. Kongresanoj ankoraŭ ne sufiĉe spertaj en la lingvouzo povas praktiki ĝin kun aliaj samideanoj de la tuta mondo, sub la gvido de konataj Esperanto-pedagogoj, s-ino Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge. Konsilindas anticipe anonci la deziron partopreni kaj indiki la nivelon (komencanto, baza, meza, progresanto).

Ĉina Eksprese. Dum tri lecionoj vi ricevos bazajn informojn pri la ĉina lingvo. Interesa kaj gaja maniero ekkoni la plej parolatan lingvon en la mondo.

Kiu kongresos kiam kaj kie?

60-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), apud urbo Kovrov (Rusio), 10-17 julio 2004. Aliĝoj kaj informoj ĉe TEJO/IJK, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam; ☎+31 (0)10 436 1044, 🖷+31 (0)10 436 1751; 🖳oficejo@tejo.org. Vizitu ankaŭ la TTT-ejon: http://www.tejo.org/ijk.

37-a ILEI-Konferenco. Ĝi okazos de la 1-a ĝis la 6-a de aŭgusto en la urbo Shashi. Temo: "Kultura kaj lingva diverseco en edukado". La aliĝkotizo, kiu inkluzivas nur la programon (do, ne la loĝadon aŭ manĝadon) varias inter 15,00 EUR kaj 55,00 EUR, laŭ la loĝlando kaj dato de aliĝo. Loĝado kaj manĝoj estas aparte pagendaj. La aliĝilo troveblas ĉe http://ikso.net/ilei/dok/aligxilo.doc. Pliaj infomoj ĉe http://ikso.net/ilei/agado/konferenco_2004.php?lingvo=eo, kaj ĉe A. Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; ❑iei001@tiscali.nl.

Internacia Infana Kongreseto ne okazos ĉi-jare, sed ja estos infanvartejo en la kongresejo. Gepatroj estas petataj volontuli; bv. sinanonci.

Ĝeneralaj informoj

Disdonado de propagandiloj kaj informiloj. Universala Kongreso estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri iu nova iniciato, pri specialaj agadoj de via faka asocio, por reklami novan eldonaĵon aŭ revuon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, por anonci iun renkontiĝon, kursaron, varon. La plej efika maniero estas enmeti la informilon en dokumentujon kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo estas aparte pagenda (275 EUR), kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA por disdonado. Neniu dokumento rajtas esti distribuata en la kongresejo sen permeso de la Estraro.

Salonmendoj kaj standoj (budoj). Ĉiuj fakaj asocioj konataj al UEA ricevis salon-mendilon por sia kunveno dum la UK, se ili tion bezonas. Salonmendoj devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 1-a de marto de la Kongresa jaro. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate, kaj eblas postuli por ili ekstran pagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocioj. Se via asocio ankoraŭ ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso. Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj kiuj volas aparte efike informi kongresanojn, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon dum la Kongreso (320 EUR). Tiujn budojn oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn kaj donacojn.

Kongresa Libroservo. Universala Kongreso estas okazo ankaŭ por aktualigi vian bibliotekon, aĉetante en la plej riĉa E-vendejo de la jaro: la Kongresa Libroservo. Multaj novaj libroj, interalie el la kongreslando mem, estos unuafoje lanĉitaj en la Kongresa Libroservo, en kiu plurajn titolojn eblos aĉeti ankaŭ kun speciala rabato. La Kongresa Libroservo havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Se vi aŭ via asocio volas vendigi viajn eldonaĵojn, necesas ke vi ofertu ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume tri monatojn antaŭ la Kongreso.

Bazaro. La Kongresa Libroservo vendas ankaŭ kasedojn, kompaktdiskojn, vidbendojn, monerojn kaj filatelaĵojn, sed principe ne pretas vendi neesperantaĵojn. Por tiaj varoj oni foje organizas Kongresan Bazaron. Interesitoj kontaktu la Centran Oficejon por peti pliajn detalojn. Ekster la Libroservo kaj la Bazaro oni ne rajtas vendi aŭ kolekti monon por iu ajn celo.

Pagmanieroj. Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn Kongresajn mendojn. Elektu tiun kiu estas por vi la plej oportuna kaj plej malmultekosta. Tamen bv. noti ke la plej sekura kaj rapida vojo estas poŝta aŭ banka monĝiro. Se vi mendas proksime al la limdatoj, bv. ankaŭ noti ke pagoj al poŝtaj kontoj ekster Nederlando (en Germanio, Svedio ktp) povas foje daŭri eĉ unu monaton. Nepre konsideru malfermon de konstanta konto ĉe UEA, ĉar tio havas plurajn avantaĝojn. Bonvolu ĉiam sendi pagojn kaj rilatajn mendilojn al la sama instanco. Kotizojn kaj donacojn al la bonfaraj kasoj oni prefere pagu al la landa peranto (vidu la liston de la oficialaj perantoj sur la interna dorskovrilo).

Pagojn por loĝigo, ekskursoj, bankedo kaj flugbileto faru rekte al Universala Kongreso de Esperanto en unu el la jenaj manieroj:

– poŝta ĝirkonto: nederlanda konto 62 73 37 (ĝiroficejo Den Haag) je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdam.

– banko: per banka ĝiro al konto 42.69.01.444 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto ĉe ABN-AmRo Bank, Rotterdam.

– poŝtmandatoj: sendu internacian aŭ nederlandan poŝtmandaton rekte al la konstanta adreso.

– UEA-konto: personoj kun sufiĉa bonhavo ĉe UEA povas sendi mendilojn kaj peti debeton al sia persona konto.

– monbiletoj: oni povas sendi monbiletojn (en eŭroj aŭ valuto ŝanĝebla al eŭroj) al la konstanta adreso, prefere en registrita koverto.

– al la poŝtokonto en la nomo de Universala Esperanto-Asocio en Belgio: 000-1631831-97 / Germanio: Köln 3182.91.509 BLZ 370 100 50 / Svedio: 74374-0 / Svislando: Bulle 12-2310-0.

Se vi pagos per banka ĉeko, bv. sendi ĝin al la konstanta adreso (sube). La ĉeko estu en eŭroj. Pagante per banka ĝiro aŭ ĉeko de ekster Nederlando, nepre aldonu 9,50 eŭrojn por la bankkostoj. Prefere ne sendu ĉekojn kiuj ne estas titolitaj al unu el la bankoj en Nederlando. Kostoj por ili povas esti tre altaj. Ne forgesu ĉiam klare indiki la celon de via pago. Loĝantoj de la Kongresa lando sendu mendilojn kaj pagojn al la kasisto de LKK.

N.B. UEA havas ankaŭ aliajn bankkontojn, je dispono de la Asocio, do ne de la Kongresa Administracio (vd. Jarlibron 2003, p. 33-34). Prefere *ne* sendu Kongres-celajn pagojn al tiuj kontoj, ĉar la traktado povas daŭri pli longe.

Kreditkartoj. Eblas pagi ankaŭ per kreditkartoj Visa, Eurocard, Mastercard, Access kaj American Express, indikante la numeron de la karto, la daton ĝis kiam ĝi validas, kaj la tri kontrolciferoj malantaŭ la kartoj (CVC-numero). En tiu kazo la pagata sumo tamen devas esti plialtigita je 5% pro administraj kostoj, tiel ke por grandaj sumoj estas konsilinde uzi alian pagomanieron.

Asekuro. La kongreskotizo ne inkluzivas asekuron kontraŭ akcidento aŭ malsano de aliĝinto dum la Kongreso. Necesas do ke ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga asekuro. La Kongreso mem ne repagas mendojn (ekz. por loĝado, ekskursoj, bankedo), se la malmendo venas post la difinita limdato. Ĉar temas pri relative grandaj monsumoj, estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno. Pri tio konsultu vian kutiman asekuriston.

Donacoj. La Kongreso bonvenigas donacojn por la ĉi-subaj celoj:
– Adoptaj Gepatroj: subvencias partoprenon en la Internacia Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– Fondaĵo Canuto: helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– Triamonda Kaso: helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.
– Blindula Kaso: helpas al blindaj kongresanoj.
– Volontula Fondaĵo: subtenas volontulan servon ĉe la Centra Oficejo.
– Ĝenerala Kaso: por la ĝenerala subteno al la organizado de la UK.

Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo *Esperanto*.

Kontaktinformoj

Centra Oficejo de UEA, Kongresa Administracio: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam; ☎+31 (0)10 436 1044, 🖷+31 (0)10 436 1751; 🖳kongresoj@co.uea.org. *N.B.* Pri ĉiuj aferoj bv. korespondi nur kun la CO kaj neniam skribi al LKK. LKK-anoj ne povas trakti individuajn petojn kaj leterojn kaj ne respondos ilin. **Retpaĝoj:** http://www.uea.org/kongresoj.

Kongresaj perantoj

Se estas en via lando, prefere sendu viajn mendilon kaj pagon al la peranto. Se ne, sendu la mendilon kaj pagon al Roterdamo. Mendojn sen pago oni ne traktos.

Argentino: Argentina Esperanto-Ligo, C. Paraguay 2357 Apto 2, 1121 ABK, Buenos Aires
Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg
Aŭstralio: Libroservo de AEA, p/a s-ro Daniel Forrest, 22 Clydebank Ave, 6280, Busselton WA
Belgio: Marcel Delforge, Rue des Glacières 16, 6001 Charleroi-Marcinelle *aŭ* Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
Britio: Geoffrey Sutton, 7 Clover Rd., Aylsham, Norwich NR11 6JW
ĈeŜio: KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice
Danio: Bent Wiinberg, Naeldebjerg Alle 30, 2670 Greve
Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, 93812, Kuressaare
Finnlando: Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula
Francio: Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris
Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
Hispanio: S-ro Pedro A. Garrote Escribano, CL Don Sancho 17 - 4º - LL, 47002, Valladolid *aŭ* Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, 08200, Sabadell
Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, Pf.193, 1368 Budapest
Islando: Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, 101 Reykjavík
Israelo: Jehošua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin
Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano
Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162 Tokyo
Jugoslavio: Milica Ristić-Dokmanović, Bulevar JNA 29/II, 11000 Beograd
Kanado: Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saarnich, BC V8L 5G5
Koreio: Korea Esperanto-Asocio, 1601 Kangbyon Hanshin Core B/D, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul, 121-703
Kroatio: Josip Pleadin, Grkinska 1, 48350 Djurdjevac
Latvio: Alìda Zigmunde, "Daugavieši", Katlakalns, Rìgas raj, 2111
Litovio: Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 3000 Kaunas C
Nederlando: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam
Norvegio: Agnar Fitjar, Wiers-Jenssensvei 33A, leil. 101, 5089, Bergen
Nov-Zelando: David Dewar, 4 Harlech Mews Avonhead, 8004 Christchurch
Pollando: Jan Książek, ul. Paderewskiego 6 m 2, 97-300, Piotrków Tryb.
Portugalio: António da Silva Almeida, Rua Macau, 3, 2_ esq., 2700 Amadora
Rusio: Miĥail Ĉertilov, P.f. 21, 143000 Moskva-Odincovo-6 *aŭ* Halina Gorecka, ab. ja. 1248, 236039, Kaliningrad
Slovakio: Milan Neubeler, Popradskej brigády 14, 058 01 Poprad
Svedio: Lisbet Andréasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94, Hörby
Svislando: François Randin, Vallombreuse 14, 1004, Lausanne
Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O. Box 1129, CA 94530 El Cerrito

Ĉu vi iras al kongreso?

La flugkompanioj de Alianco Stelo (Star Alliance) estas kontentaj esti via oficiala flugkompania reto. Voku al iu ajn el niaj 15 membro-kompanioj kaj simple citu la **eventan kodon (event code) SK401S4** por ricevi detalojn kaj kondiĉojn pri la tarifoj Alianco Stelo Kongresoj Plus (*Star Alliance Conventions Plus*) kaj la partoprenantaj flugkompanioj. Por informoj pri niaj membro-kompanioj kaj aliaj produktoj, vizitu nian TTT-ejon ĉe www.staralliance.com.

STAR ALLIANCE™
La flugkompania reto por la Tero.